

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO



N° 203 DECEMBRO 1999

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta PIO X-a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM

FELIĈAN
JUBILEAN
JARON

2000

Bonne Année 2000!

Sommaire/Enhavo

Pages/Paĝoj

Le mot du président - <i>La bileto de la prezidanto</i>	3
Prière - <i>Preĝo</i>	5
Paix - <i>Paco</i>	7
<i>Kial ni nomas Dion "Patro" ?</i>	10
<i>Protokolo</i>	12
<i>En nia Asocio</i>	13
Kalendaro	15
Journée Mondiale Jeunesse - <i>MJT</i>	17
Jubilée - <i>Jubilea Jaro</i>	18
<i>Religiaj Poemoj de Leszek Legowski</i>	
Abonnements - <i>Kotiztabelo</i>	

ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO

Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
Sendinto 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

Motif de non distribution

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé

PORT PAYE

COLMAR (68)

Surkovrile

Di-benitan Jaron de la
Granda Jubileo 2000 ,
sanon, feliĉon kaj
progreson de nia kara
lingvo ,
deziras al Vi .
La Redakcio .

L'esperanto. Face aux
problèmes linguistiques, une
langue neutre vraiment
internationale pour les contacts
directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas
reprodukti kondiĉe ke estu
citata la fonto. Specimenon
kun represo aŭ tradukado
oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la
bulteno oni sendu al la
redakcio nepre antaŭ la
10.a de marto 2000.
Venonta bulteno aperos fine
de marto..

Finpresado la 07/01/2000

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Nro 203 Decembro 1999

Trimonata eldonaĵo de
Franca Katolika Esperanto
Asocio (Association Catholique
Française d'Esperanto
A.C.F.E)

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:

S-ro A. BESSIERE
28, Rue C. St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:

F-ino A.M. CHANEY
56, Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :

S-ro G. VILLENEUVE
14, Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :

P-ro L. BOURDON
7, Av. Salomon
59800 LILLE

Peranto IKUE:

S-ro M. COLLEU
95, Rue Victor Hugo
80440 BOVES

Redakcio :

Fam. BASSO-RESCIO
9, Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM

Fakse 0389794333

Rete 100623,3022@Compuserve.com

Le Mot du Président

L'an 2000 est à notre porte et nous allons très bientôt
entrer dans le troisième millénaire .

Comme l'a déjà écrit le Pape Jean-Paul II dans son
encyclique "Tertio millennio adveniente", le siècle qui s'ouvre
devant nous sera celui des jeunes générations, lesquelles,
nées dans ce siècle, arriveront à maturité dans le suivant.

C'est à eux que nous devons faire confiance pour
continuer à porter le flambeau de la Foi et continuer
d'oeuvrer pour l'expansion de la langue universelle. Notre
monde a autant besoin de l'une que de l'autre. Ce serait une
grave erreur de penser que les personnes âgées sont seules
capables de faire progresser l'Eglise et le mouvement
espérantiste. L'une et l'autre ont grand besoin de
l'enthousiasme et de la générosité désintéressée des
jeunes. Ceux ci sont l'avenir et , loin de craindre leur fougue,
il y a lieu de faire confiance à leur entrain pour apporter en
tout lieu le renouveau, l'allant et l'ardeur de leur âge.

Ils sont l'avenir; ils sont capables ; ils sont
enthousiastes; ils sont généreux; ils sont pleins de
dévouement; ils sont désintéressés.

Acceptons les sans réserves car ils sont l'avenir et
les dirigeants de demain.

Que la nouvelle année 2000 vous apporte joie et
bonheur et vous maintienne dans la paix du Christ.

La Bileto de la Prezidanto

La jaro 2000 staras ĉe nia pordo kaj tre baldaŭ ni eniros la trian miljaron.

Kiel jam skribis Papo Johano-Paŭlo II en sia encikliko "Tertio millennio adveniente", la jarcento, kiu malfermiĝas antaŭ ni, estos tiu de la junaj generacioj. La junuloj naskitaj en la nuna jarcento, maturiĝos en la sekvanta.

Sur ili ni devos meti nian fidon por daŭre porti la torĉon de la Kredo kaj labori por la disvastigo de la Universala Lingvo. Nia mondo bezonas ambaŭ. Estus grava eraro opinii, ke nur la maljunuloj kapablas progresigi la Eklezion kaj la esperantistan movadon.

Ambaŭ bezonas la entuziasmon kaj la malavaran sinoferon de la junuloj. Tiuj ĉi estas la estonteco kaj fore de timi ilian impeton, bezonas fidi sur ilia entuziasmo por alporti ĉien la refervoriĝon, la viklecon kaj ardon, kiujn ilia aĝo postulas.

Ili estas la estonteco; ili kapablas; ili estas entuziasmaj; ili estas plenaj je sinofero kaj nobleco; ili estas neprofitemaj.

Ni akceptu ilin senrezerve, ĉar ili estas la estonteco kaj la margaŭaj estroj.

La nova jaro 2000 alportu al vi ĝojon kaj feliĉon; ĝi konservu vin en la Kristopaco.

DIA MESAĜO

Konvertigu nin,
Ekmovigu nin;
Via mesaĝo fariĝu
Karno el nia karno,
Sango el nia sango,
Kialo de nia vivo.

Ĝi elradiku nin
El la bonkonscienca
trankvilo.

Ĝi estu postulema,
maloportuna,
Ĉar nur tiamaniere
Ĝi alportos al ni la pacon.

Vian pacon.

Dom Helder Camara

DANKO

1. Dum ho-moj vi - vas sur la te-ro,
2. Dum ho-moj ho-majn vor-tojn di-ras,
dum fruk-tas gre-no kaj o-liv',
dum vo-kas vi - a vort' al pac',
Vi por ni ĉi-uj es-tas Pa-tro.
Vi Vin de l' mon-do ne re-ti-ras.
Ni dan-kas Vin pro ĉi - a viv'.
Ni dan-kas pro Je - su - a grac'.
3. Vi nutras birdojn en arbaro,
Vi vestas florojn sur la kamp';
fortika estas Vi remparo
por ŝirmi nin en ĉiu temp'.
4. Vi estas lumo, viv' eterna;
de l' morto savas via man'.
Al ni Vi donis vian Filon;
Li estas nia viva pan'.
5. Al Vi ni do adoron faru,
pro kies am' ekzistas ni;
en nia mezo, Patro, staru,
parencoj viaj estas ni.

T: Huub Oosterhuis 1960. M: Tera de Marez Ozens-Wansink 1960. E: Adolf Burkhardt 1977. La kanto prenita el baldaŭ aperonta Ekumena Diserva Libro de IKUE kaj KELI. Ĝia titolo estos ADORU. La eldonon preparas Liturgia Grupo de la Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI. Ĝi estos riĉenhava kun multaj kristanaj kantoj kun muziknotoj, internacie elektitaj melodioj. Bibliaj tekstoj kaj preĝoj por Diservoj kaj por privata uzo. Mestekstoj laŭ la oficiala Meslibro.

LA PACO estas samtempe malfacila, kaj necesa, kaj tutebla.

Nuntempe estas milito en Jugoslavio, Orienta Timoro, Afganistano, Ĉeĉenio, ktp. Bonvolu sincere aldiri ke la militoj fariĝas pli kaj pli malhumanaj kaj etenditaj. Tie kaj alie estas teruraj konfliktoj, kiuj sin anoncas ...ne atendite. La homoj, aŭ individue, aŭ en grupoj, ĉiam havis malfacilaĵojn porpace agi. Tia psika, malbona dispono klarigas la malrapidecon de la sociaj laboroj kaj la oftan detruon de la jam finitaj konstruaĵoj aŭ variaj laboroj. Tiele sinklariĝas la malrapideco de la teknikaj progresoj.

Ĉu ni povas esperi ke, dum la tria jarmilo, la homoj trovos la necesajn sperton kaj kuraĝon lerni kaj paroli la tutmondan lingvaĵon de la frata paco anstataŭ tiun de la konkurenca komerco, de la egoismo kaj de la milito fariĝas gravega: Fakte la destrurimedo fariĝas tiel fortaj kaj nombraj, ke ni devas krei novajn nomojn por designi ilian nunan efikon: la ĝeneralan masakron, la universalan detruon; la plej malhumanan volon; la tutmondan eliminadon.

Inter aliaj, la Kristanoj devas esti konvinkitaj ke la granda preĝo PATRO NIA tute ne estas peto ke Dio nin anstataŭigu; sed ke Dio nin helpu; Eĉ se, feliĉe, Dio la Kreanto ĉiam restas la ĈEFA kaŭzo, la homoj konservas sian gloran rolon, helpataj de Dio, de DUA kaŭzo. La Misiistoj ne rajtas forgesi anonci tiun gravan veraĵon. Dio ne estas diktatoro; sed nia amema kaj superinteligenta Patro.

Louis Bourdon op.

KIAL NI NOMAS DION "PATRO" ?

"O Vi, ĉiotransa, kiel nomi vin alimaniere?" (Gregorio el Nazianco -4a jarcento) kaj tamen Dio ne rifuzas kompariĝi kun paŝtisto, edzo, amiko, patro, patrino.

"Kia estas tenero de patro por filoj, tia estas la Sinjoro, por kiu adoras lin" (Ps, 103, 13). "Kiel tiun, kies patrino konsolas, tiel mi konsolos vin" (Is 66, 13).

Se kristanoj nomas Dion "Patro", tio ne devenas de iu elekto inter la diversaj nomoj eblaj, sed ĉar Jesuo nomis Lin "Patro". Sekve ne la vorto "patro", sed la vivo kaj la preĝo de Kristo diras al ni, kiu Dio estas. "Neniu scias, kiu estas la Patro se ne la Filo kaj tiu, al kiu la Filo bonvolas tion reveli" (Lk 10, 22). Ni ne devas nin determini laŭ niaj personaj travivaĵoj rilate tion, kion ni asocias kun la vorto "patro" (aŭ "patrino", "amiko", ktp). Tio, kio Dio estadis por Jesuo difinas la sencon de lia nomo "Patro".

Laŭ sia gepatra lingvo, aramea, Jesuo diradis "abba" (Mk 14, 36), tio estas "Patro". Kelkaj ankaŭ proponis la familieran tradukon "paĉjo" por substreki, ke Jesuo konfidis Dion kiel infano. Sed necesas ne forgesi, ke abba estas ankaŭ "Mia Patro" kaj ke en la Malnova testamento nur reĝo havis la privilegion alparoli Dion per tiuj vortoj. Okaze de la enoficigo de la reĝo Dio proklamas "Li nomos min 'Mia Patro'" (Ps 89, 27). En la aramea versio de la sama psalmo "Li nomos min abba".

Komprenita tra tiu intimeco la rilato inter Dio kaj Jesuo estas ne nur fila konfido. Tiurilate Dio unua konfidas Jesuon. Okaze de la baptado de Jesuo kaj de la Transfiguriĝo surmonta, la voĉo Dia aŭdiĝas: "Tiu estas mia Filo plej amata, kiu havas mian tutan favoron" (Mt 3, 17 kaj 17, 5). Samkiel antaŭlonge Li donis la povon al la izraelaj reĝoj, Dio donas al Jesuo

la legitiman aŭtoritaton kaj la plenajn povojn por lia misio. Tial anstataŭ "Mia Patro" Jesuo rajtas ankaŭ diri "Tiu, kiu sendis min" (Jn5,25) aŭ "La Patro, kiu sendis min" (Jn12,49)

Nomi Dion "mia Patro" signifas, ke Dio amas nin. Kristo kiel Filo rivelas al ni, kia estas tiu amo. Ne temas pri amo, kiu tenas (retenas). La amo de la Patro sendas Lian Filon enmonden. Tiu sama amo sendas ĉiun el ni enviven, liberigante en ni fortojn kaj dinamikon. La voĉo de l'Patro "Vi estas mia filo plej amata, mi ĝojas pro via estanteco" permesas al ĉiu homo ami la vivon kaj krei ĝin kun Dio.

KIEL KOMPRENI "NE KONDUKU NIN EN TENTON"

Eble temas pri la plej diskutata peto de la Nia Patro. Ĝia traduko donas problemojn, unue pri la senco donenda al la vorto "tento". La responda verbo signifas "elprovi", "testi". La substantivo, praktike fora de la profana greklingvo kaj dudekfoje uzita en la Malnova Testamento, signifas "provon". Ekzemple, tra la kvardeka restado endezerta Dio "provis" la izraelian popolon "por koni la fundon de ties koron" (Dt8,2). La provo estas lima situacio, kiu elfosas la fundamentan orientiĝon de l'kredanto: en sia malfeliĉo ĉu l'jobo malbenos Dion aŭ ĉu li daŭre alligos sin al Li? Tiuj duraj momentoj estas ankaŭ "tentoj", ĉar, traŭrante ilin oni povas senti sin altirita al la malbono aŭ al la malespero. Sed la unua senco de la biblia dirmaniero restas "provo" aŭ "testo". Tiuj provoj ne estas nepre konsiderataj kiel malfeliĉo: "Rigardu ĉion kiel ĝojigan, kiam vi falas en diversajn tentojn, sciante, ke la provado de via kredo faras paciencon" (Jk1,2-3).

Kion ni tiam petas de Dio per tiu peto de l'Nia Patro? La eldiro "ne eniri la provon (aŭ la tenton)" de la

rakonto sur monto Olivarba (Mt26,41) helpas nin vidi pli bone. En la "Nia Patro" temas pri la kialiga (kaŭziga) formo de tiu eldiro: "Ne konduku nin en tenton". Ni petas Dion, por ke Li protektu nin kontraŭ la provon. Laŭ sankta Luko Jesuo ripetis sur la monto Olivarba tiun saman instruon: "Preĝu por ne eniri la provon t.e. "Preĝu Dion, por ke Li gardu vin kontraŭ ĝin" (Lk22,40).

Sed ĉu ni povas preĝi, por ke ni neniam estu provataj? Ĉu ni ne devus preferi peti la forton por esti fidelaj, la saĝon por alfronti artifikaĵojn de l'malbono? "Gardu nin kontraŭ la provo" estas infana preĝo. Infano ne petas la forton por alfronti la suferon sed la sekurecon apude de tiuj, kiujn ĝi amas. Tiu infana simpleco dumpreĝe respondas al tio, kion Kristo konigis al ni pri Dio. Li ne estas senindulga Mastro, kiu malice ĝuus testante nin.

"Dio ne povas esti tentata de la malbono kaj plie provas (tentas) neniun" (Jk1,13).

Tiu antaŭlasta peto de l'Nia Patro ehas la duan: "Venu Via Regno". La eligo de la provoj ŝajnas maleblaĵo sed preĝante por la Diregno ni ne atendas malpli: "La morto ne plu estos. Doloroj, krioj, ploroj ne plu estos" (Ap21,4). Kie Kristo estas, tie Diregno estas. Kie estas la Sankta Spirito, kiu relevigis Lin, tie ni estas gardataj kontraŭ la provon. Tiujn, kiuj sin vestis de Lia amo, la Tentado ne kaptas (1Jn5,18). "Faru, ke ni ne eniru tenton" povas esti ankaŭ dirata: "Gardu nin kunligitaj al Kristo".

Tradukis el Lettre de Taizé, Pastro Roger Degrelle
54490 Piennes.

Protokolo de la Komitatkunveno de la 20-a de Oktobro 1999

Ĉeestis :S-ro Bessière,Pastro Bourdon,F-inoj Chaney kaj Michel ,S-ino Lafargue,S-roj Pons kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: F-to Marmou,s-roj Colleu,Despiney kaj Basso.,S-ro Basso.

Observis: Pastro Héroux,s-ro D.Chevalier.

S-ro Villeneuve prezentis la financan situacion de la asocio; ĝi estas bona.

La pilgrimo en Lourdes bone sukcesis kaj raporton pri ĝi publikigis la revueto Nederlanda Katoliko.

Pastro Bourdon kaj s-ro Despiney jam informis, ke venontjare ili ne rekandidatiĝos kiel komitatanoj. Pastro Héroux kaj s-ro Daniel Chevalier anoncis siajn kandidatiĝojn. Aliaj kandidatoj anoncu sin ĉe la prezidanto antaŭ la 31-a de januaro 2000.

La prezidanto varme dankis Pastron Bourdon pro la grava laboro kaj la valora helpo alportitaj dum pluraj jaroj al nia asocio. Li ankaŭ transdonis al li libron de la verkisto Istvan Nemere, kiel omaĝo al lia kunlaboro.

La komitato decidis , ke la venonta ĝenerala kunveno okazos en Parizo la sabaton la 6-an de

majo 2000.

La sekretariino petos la necesajn informojn pri nia pilgrimo al Lisieux en 2001. La precizan daton oni fiksos en venonta januaro.

La nomo de nia bulteno aperos sur Franca Esperantisto en la listo de la revuoj aboneblaj ĉe France-Esperanto. Plie la komitato decidis aperigi dufoje pagitan reklamon sur Franca Esperantisto por konatigi nian ekziston.

S-ro Pons raportis pri la ekumena kongreso en Gliwice (Pollando) kaj la situacio de la disdonado de la libro "Dio parolas al siaj infanoj."

Pastro Héroux ankaŭ raportis pri la internacia kongreso de la fervojistoj en le Mans, kie li prezidis ekumenan diservon.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la 19-an de januaro 2000.

La kasisto informas:

Multaj membroj de nia asocio (1/3) forgesis pagi kotizon 1999.

Estas por nia asocio mono kaj laboro por peti tion al Vi.

Helpu nin kaj tuj pagu vian kotizon 2000 antaŭ forgesi.

Sendu rekte al la kasisto G. VILLENEUVE 14, Rue du Clair de Lune 91 530 SAINT CHERON .

Ne sendu al la prezidanto aŭ redakcio.

Dankon.

EN NIA ASOCIO

Novaj membroj : S-ro PERRETTE 22500 PAIMPOL
S-ro BAUD 74000 ANNECY.

Bonvenon al la novuloj.

Interveno de Ĉefepiskopo Mons. D-ro György Jakubinyi favore al Esperanto dum la Sinodo de Eŭropaj Episkopoj.

La 4-an de oktobro 1999 en Romo la Ĉefepiskopo D-ro Jakubinyi el Alba Iulia, Rumanio denove intervenis dum grava eklezia kunveno -La Dua Sinodo de Eŭropaj Episkopoj - favore al Esperanto . Ĉi-sube ni publikigas parton de lia oficiala itallingva interveno, proponante praktikan uzadon de Esperanto -"la nova latino" en la ekleziaj sferoj.

<< La Instrumentum Laboris (n-ro 86) antaŭvidis ankaŭ la starigon de la unueco en nova Eŭropo, " la ĉiutagan travivon de la Eklezioj mem ". Kaj je ĉi tiu punkto mi deziras ripeti tion, kion mi jam diris dum la Unua Speciala Asembleo por Eŭropo (la 29-an de novembro 1991). " Oni parolas ankaŭ pri lingva imperiismo, de tiu, kiu volus altrudi kiel internacian sian propran lingvon, al kiu ligiĝas ankaŭ kulturo kaj

mondokonceptado. Per la Latina la Eklezio estis en tre taŭga situacio, sed preter la fakto, ke ne konis ĝin la Eklezioj de nelatina rito. Hodiaŭ ĝi estas sufiĉe malkreskanta, kiel oni konstatas ankaŭ dum ĉi tiu Sinodo. Por solvi ĉi tiun problemon en Eŭropo, almenaŭ en la eklezia sfero, estus petdezirinda adopto de internacia artefarita lingvo, kiel Esperanto. Al tio kontraŭas la kutimo paroli la mondajn denaskajn lingvojn kaj ankaŭ iagrada kontraŭsemitismo, ĉar Esperanto estis inventita de pola hebreo" . tion koncerne la internaciajn rilatojn.

KALENDARO

2000

- 31/05 HAMBURGO (Germanio)
ĝis 94-a Germana Katolika Foiro kun
04/06 Esperanto-Stando kaj prelego
(artikolo en sekvonta paĝo)
- 15/07 SAINT-JEAN PIED-DE-PORT (Francio)
PILGRIMO al SANTIAGO de COMPOSTELLE
Piede .
Informoj ĉe S-ano Rudolf-Josef FISCHER
Gustav-Adolf Stasse 2a
D-48356 NORDWALDE . Germanio

- 15/07 SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomysl
19-a IKUE E-Tendaro.
ĝis Ĉiu tendara tago komenciĝos per
esperantlingva Sankta Meso en tendara
22/07 frateca kaj amikeca etoso. Venu travivi
en ĉarma naturo belan semajnon en la
Jaro de la Granda Jubileo .
Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas
haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio
Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE .
- 25/07 TEL-AVIVO (Israelo)
ĝis 85-a Universala Kongreso de Esperanto
01/08 [http://ourworld.compuserve.com/
homepages/profcon/m_uk85.html](http://ourworld.compuserve.com/homepages/profcon/m_uk85.html)
- 05/08 HONGKONGO (Ĉinio)
ĝis 56-a Internacia Junulara Kongreso
12/08
- 13/08 TAIZE (Francio)
4-a Junulara Ekumena Esperanto
ĝis Tendaro (JET)
rete: <http://www.taize.fr>
- 20/08 aliĝu ĉe:
Bernard Eichkorn, Romaŭsring 20
D-78050 VILLINGEN Germanio
rete: Bernhard.Eichkorn@esperanto.de

JUNULARA MONDA TAGO 2000
10-14 de aŭgusto en Venecio
15-20 de aŭgusto en Romo

En Venecio loĝos 500 eksterlandaj gejunuloj, antaŭ ol atingi Romon. Ili loĝos ĉe familioj, kaj estos akceptataj fare de volontuloj. Oni vizitos Venecion, ĉu laŭ arta kaj kultura flanko, ĉu laŭ spirita flanko. Ni travivos fest-vesperon preĝante kaj celebrante kune la Eŭkaristion. La 14-an de aŭgusto la gejunuloj foriros al Romo, kie okazos de la 15-a ĝis la 20-a de aŭgusto 2000.

XV-a Junulara Monda Tago

Mardo la 15-an de aŭgusto, pm : Ĉieliro de la Beata Virgulino Maria: Malferma Meso de la XV-a JMT .
16-17-18-an de aŭgusto: Matene katekizadoj por la gejunuloj, proponataj laŭ pluraj lingvoj. Posttagmeze kaj vespere variaj momentoj por preĝo kaj spirita formado, renkontiĝo, frateco, spektaklo, histori-kultura kono pri Romo, proponataj al ĉiuj gejunuloj.
Vendredo la 19-an de aŭgusto - je malfrua posttagmezo Krucvojo en la akceptejoj lokoj.
Sabato la 19-an de aŭgusto: pilgrimado al la loko de renkontiĝo kun la Sankta Patro (Tor Vergata - ĉirkaŭurbo de Romo). Vespere preĝa maldormo kun la Sankta Patro.
Dimanĉo la 20-an de aŭgusto - matene konkluda Meso de la XV-a Junulara Monda Tago celebrata de la Papo.
Grupo Esperanto: Respondecujo: Paola Ambrosetto
retadreso: esperantovenetia@libero.it

Spirita gvidanto: Pastro Lajos Kobor (Hungario)
Aliĝilojn akceptas: Gianluca Serbo, via Nazario
 Sauro 23, I-36100 VICENZA, Italio
 Tel: 0039/0444/513574 rete:giserbo@tin.it
 (Francaj gejunuloj povas peti subvencion ĉe la
 redaktoro: Basso Michel).

94-a Germana Katolika Foiro, Hamburgo 31.05-04.06.2000

De la 31-a de majo ĝis la 4-a de junio 2000 okazos en Hamburgo la 94-a Germana Katolika Foiro kun pli ol 50.000 partoprenantoj. Dum en antaŭaj jaroj en grandaj kristanaj aranĝoj oni evitis diskuti pri lingvaj problemoj, la invito al la Katolika Foiro en Hamburgo eksplicite mencias, ke oni celas i.a. trovi respondojn al la demando: "Kiamaniere la tutmonda interna komunikado en la eklezio povas sukcesi pli bone?"

La gvidantoj de la aranĝoj oficiale akceptis ĉiujn tri proponojn de la germana IKUE-sekcio (informstando, prelego kaj meso). La infomstando okazos de jaŭdo ĝis sabato, la meso sabate de 11h00 ĝis 12h00 kaj la prelego sabate de 14h00 ĝis 16h00.

Ĉefepiskopo Jakubinyi definitive konfirmis sian venon kaj predikos en Esperanto dum la Meso.

Nia slogano tie estos: "Esperanto-kompreniĝo por nova jarmilo". La prelego (germanlingve) "Esperanto, ĉu nova latino de la eklezio?"

informis: Ulrich.Matthias@t-online.de

Jubilea Jaro

DE KIE DEVENAS ESPRIMO JUBILEA JARO?

La esprimo "jubilea jaro" aŭ "jubileo" havas la hebrean kaj la grekan radikojn. En la hebrea Biblio indikas la esprimo *yobel* unue virŝafon, poste virŝafan kornon, servantan kiel trumpeto. Tiu ĉi trumpeto anoncatis ĉiam post kvindek jaroj unu eksterordinaran jaron, la jaron de "pardonado de la ŝuldoj". Ĝi estis solene malfermita pere de virŝafa korno-sonoro kaj nomiĝis "Yobel-jaro" aŭ simple "Yobel". La latina vorto *jubilium* (de: *jubilare*) rilatis al amika alvoko de paŝtistoj. Kiam la sankta Hieronimo tradukis dum la jaroj 391-406 la hebrean Biblion en la latinan, li ŝanĝis *yobel* per *jubilaeus* (kaj ne per *jubolaeus*, kio estas pli proksima al

hebrea *yobel*). Tiel kunfluis jubilado de paŝtistoj kun la Yobel-jaro de la malnova Israelo. En la Biblio, en la traduko de Hieronimo, kiun oni pli ol mil jarojn en la Eklezio uzadis, estis do el la Yobel-jaro - jubilea jaro.

Fine de mezepoko la ideo de speciala jaro pere de proklamado de "sankta jaro" denove aktualiĝis. Tiukaze estis farita koncedo - permeso de pekspardono pere de Papo. Ekde tiam estis diskonigita la indiko Jubel-jaro aŭ Jubilea Jaro, kiel jaro de apartaj gracoj por kredantoj en multaj eŭropaj landoj. Sed ankaŭ ĉiutaga lingvo uzas ĉi tiun vorton. Ekzemple, se iu festas sian 50-an jubileon aŭ alian gravan, "rondan" naskiĝtagon.

LA UNUA KRISTANA JUBILEA JARO 1300

La unuan Sanktan Jaron ne iniciatis la Papo, sed kristana popolo. La 1-an de januaro 1300 venis multaj pilgrimantoj al Romo. Ili esperis dum la datrevena tago de la naskiĝo de Jesuo kaj per vizito de tomboj de la apostoloj Petro kaj Paŭlo liberiĝi de siaj pekoj kaj siaj ĉagrenoj. Romo travivas ĝuste unu pacan periodon. Bonifaco la VIII-a - la stranga viro - estas jam ses jarojn la Papo.

Pro deziro de la nacio li malfermas la 22-an de februaro 1300 la unuan kristanan jubilean jaron: de la Kristnasko 1299 ĝis la Kristnasko 1300. Bonifaco la VIII-a ligas kun la enkonduko de la Sankta Jaro la ideon, ekde nun ĉiun pluan jarcentan datrevenon

ekde la naskiĝo de Jesuo aparte apreci. Dum la Sankta Jaro restas la pordo de la Baziliko de Sankta Petro tage kaj nokte malfermita.

LA SANKTA PORDO


La Papo malfermos per martelo-bato solene la sanktan pordon de la Baziliko de Sankta Petro. La pordo restos malfermita dum la Sankta Jaro kaj ĵarfine ĝi denove fermiĝos. Similaj festoj okazos ankaŭ en ceteraj tri ĉefaj bazilikoj en Romo.

LA GRANDA JUBILEO 2000

La 10-an de novembro 1994 anoncis Johano Paŭlo la II-a per la apostola skribaĵo "Tertio millenio adveniente" la jubilean jaron 2000.

(Laŭ germana fonto kompilis Jitka Skalická)

(EL DIO BENU Nro 4-99)



MI SENDAS BILDKARTON FESTAN...


(ŚWIĄTECZNĄ POSYŁAM KARTKĘ...)

Mi sendas bildkarton festan,
kun tre ĉarma abi-branĉeto...
Kun Di-infan' en brakoj
de la plej Sankta Virgineto.
Ĉe l'Kor' Patrino Li sentas
ritmon sanktan, ĝojplenan –
de l'vigilia kant' pacema...

Ricevu festan karton –
iom da neĝa ĉiel' blua.
Sub tegment' de ciaj revoj
denove sonu kanto ĝua...
Kun steloj ridetantaj
kaj kun la kant' de l' Vigilio:

Hodiaŭ en Betlehem' naskiĝis –
Jesuo Kristo-Infan' – Dio!

De Leszek Łękowski
Bydgoszcz. 1999



Rideto estas komunikiĝema. Ĝi estas la ununurajo
kiun oni povas donaci kiam oni ne plu havas ion
nek scias kion diri. (Pastoro Ch. Mazel, Ev. et liberté)

DI-INFANETO (BOŻA DZIECINA)

Ĉiela Di-infaneto
febla
kiel pan-peceto
venis al mond'
el Ĉielo
nin pliriĉigi –
per Amo!

Febla sensekura Bebo –
nia Di' –
Lumo

Brilo

Ardo!



Majo 99
Pilgrimo en
LOURDES.

Tombo de
Pastro PELTIER.

Kotiztabelo 2000

Frankoj Euroj

I.K.U.E kun "Espero Katolika"

164 25,00

Peranto : S-ro M. COLLEU

95, Rue Victor Hugo 80440 BOVES

P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE .

A.C.F.E kun "Franca Katolika E-isto unuopulo : 60 9,15

geedza paro : 80 12,20

gejunuloj ĝis 25jara, pastro, religiu(in)o : 30 4,57

bonfaranto : 200 30,50

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 4ème trimestre 1999

C.P.P.A.P : N° 62532

Imprimé par : A.C.F.E à 9, Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM

Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris

sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996

Directeur : Albert BESSIERE

Directeur délégué: Michel BASSO